

voĉon (certe la voĉon de l' Kuniklo) diranta :  
 " Pat, Pat, kie vi estas, kanajlo ? " kaj responde  
 (de malproksime) jen alia voĉo de ŝi nekonata :  
 " Se plaĉas, Moŝto, jen mi tie ĉi. Mi fosas  
 pomojn. "

" Fosas *pomojn* ? Ĉi tien, sencerbulo, kaj  
 eligu min el *ĉi tio*. " (Denove aŭdiĝas sonoj de  
 frakasata vitro.)

" Nun, vi diru al mi, Pat, kio tio estas en la  
 fenestro ? "

Brako, Ekscelenco. (Laŭ la akcento per  
 kiu li parolis li certe estis irlandano.)

" Ĉu 'brako' vi diris, stultulo ? Kiu en la  
 tuta mondo iam vidis brakon tiel grandan ? Ĝi  
 ja ŝtopas la tutan fenestron. "

" Estas vero, Ekscelenco ; sed, malgraŭ ĉio,  
 ĝi estas brako. "

" Nu, ĝi ne devas esti tie, kio ajn ĝi estas.  
 Vi iru tuj kaj forprenu ĝin. "

Post tio sekvis longa silento ; nur malofte  
 Alicio aŭdis flustraĵojn : ekze.,

" Mi ne ŝatas ĝin, Moŝto, tut' ne, tut' ne ! " kaj  
 " Vi obeu, malkuraĝulo. "

En la fino ŝi la duan fojon eletendis la manon  
 kaj faris provkapton en la aero. Ĉi tiun fojon ŝi  
 aŭdis *du* timkriojn, kaj ankaŭ duobligis la sonoj  
 de frakasata vitro. " Tiu kukumejo nepre  
 havas multe da kadroj " pensis Alicio. " Kion  
 oni projektos nun ? Pri la projekto eltiri min

el la fenestro, se nur ili povus, mi estus tute  
 kontenta, ĉar mi ja ne volas resti tie ĉi  
 eterne. "

Pasis kelka tempo en plena silento. Poste  
 rompita la silenton rulbruo de malgrandaj  
 vagonadoj, kaj voĉoj ne malmultaj ekparolis  
 ĉiuj kune. Ŝi elaŭdis nur la sekvantajn :

" Kie la alia ŝtupetaro ?—Mi ja devis alporti nur unu, la alian  
 Bil alportas—Bilĉo, ĝin starigu tie ĉi—Jen en ĉi tiu angulo ni  
 starigu ilin—Ne, ne ! antaŭ ĉio necesas kunligi ilin, alie ni ne  
 atingos la fenestron—Vi ne ĝenu vin, ili jam sufiĉe taŭgas—  
 Vi, Bil, ekkaptu ĉi tiun ŝnuron—Ĉu la tegmento subtenos la  
 premon ?—Gardu vin, jen malfiksiĝinta ardezaĵo—Ho, ĝi jam  
 falas, gardu la kapojn sube—(Laŭta frakaso)—Nu, kiu fuŝis  
 tion ?—Mi kredas ke Bil—Kiu devas derampi la kamentubon ?  
 —Ne, mi ne volas, vi rampu mem—Tion ne *mi*, Bil devas—  
 Bil, la mastro ordonas ke vi derampu. "

" Do, Bil devas derampi la kamentubon "  
 pensis Alicio. " Ĉiujn malagrablaĵojn oni trudas  
 al Bil. Mi ne volus esti en la situacio de Sro.  
 Bil. La fajrujo estas tre mallarĝa, sed malgraŭ  
 ĉio mi nepre sukcesos trafi lin per la piedo. " Ŝi  
 eliris la piedon kiel eble pleje el la tubo kaj  
 atendis ĝis ŝi aŭdis tutapude en la tubo ĉirkaŭ-  
 gradadon kaj rampadon de iu besteto (kiaspeca  
 ĝi estis, ŝi el la sonoj ne povis diveni). Tiam  
 dirante al si ' Tio nepre estas Bil ' ŝi provfrapis  
 per la piedo en la tubon, kaj atende aŭskultis. "

Unue ŝi aŭdis laŭtan ĥoron :

" Jen Bil tie supre ! Pafiĝis el tubo !! Falas teren !!! "

